

## & Al mizantropoj:

< Rekante 19 el 35 batoj por strofo, entute 280 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por &Miskompreno. Klarigo (\*): '4 La dek ordonoj de dio laŭ juda kaj ĥristana libro de Moseo.>

### (#Melodio:

; <:35> (/domi somi lami soso; fare mido reTi do; domi somi lami soso; fare mido reTi do;

(#Rekantaĵe: so3mi domi reeredo TiSo; so3mi domi reeredo TiSo; domi soosomi laalami soso; fare mido reereTi SooLaTi doTi do o)

)×8 )+

### (&Strofoj:

'1 /Kelkaj kun ĥimeroj sidas; Hejme apud sia forn'; Kaj la mondon ili vidas; Nur tra lens' de sia lorn';

(×:; **Kantu nun per forta la voĉo ; Kantu laŭte kaj dum diboĉo ; Kaj ni laŭdu, ne aŭdu riproĉon ; Kantu nun per forta diboĉa la vorta voĉ'.**)

'2 Laŭ ilia perspektivo ; Ĉion kovras ĉasta gaz', ; Ili neas, ke la vivo ; Pulsas sub ilia naz'; .....

'3 Ili kun sopir' fabelas ; Pri modele dolĉa mond' ; Kaj de l' homoj for sin ŝtelas ; Kvazaŭ vivi estus hont'! .....

'4 Jes, ni scias, – post prapatro ; Ankaŭ ni, se tentas log', ; Ofte vagas trans la kadro ; de malvasta dekalog'\*, .....

'5 Kaj sen nigraj okulvitroj ; Ni konstatas, – kial ne? – ; Ke grandparte la ĉapitroj ; De l' Homara Epope' .....

'6 Ne tre glorie sin prezentas, ; (Eĉ dum tempoj de l' kultur'), ; Sed ni des pli bone sentas, ; Ke ni estashomoj nur... .....

'7 Ke el polvo re- en polvon ; Tiras nin la homnatur', – Kial do ni serĉus solvon ; de la cirkla kvadratur'? .....

'8 For do la grumblantan maskon, ; La grimacon de l' cenzur', ; Kaj plenumu vian taskon: ; Esti homoj! – Homoj nur! .....